

Protokolo de estrara interkonsiliĝo de Norvega Esperantista Ligo ĵaŭdon la 10-an de oktobro 2013 per Skype.

(Protokolo aprobita la 7an de novembro 2013.)

Partoprenis:

Jardar Eggesbø Abrahamsen en Trondheim
Anne Karin Bondhus en Bryne
Ulf Lunde en Os
Amelie Matt en Tromsø
Herman Raner en Trondheim (de la 6. punkto)

0. Tagordo

Aprobita.

Ĉar la sekretario mankas, oni elektis Amelie kiel sekretario.

1. Aprobo de protokolo de la pasinta estrara interkonsiliĝo (12.09.2013)

Aprobita.

2. Ekonomio

La kasisto raportis pri la ekonomio: Skagen Vekst kr 38 617,- Skagen Høyrente kr 63 768,-

3. Proceduroj je aliĝoj

Mario malnetis bonvenleteron esperante, aprobita kun malgranda aldonaĵo :

La membrototizoj estas 330 kronoj *jare* por plenkreskuloj kaj 220 kronoj por junuloj malpli ol 30-jaraj.

Ni tradukos leteron norvegen kiam ĝi pretos.

Kiam novaj membroj aliĝas, ni sendos nian novan koloran broŝuron, bonvenleteron kaj la plej novan eldonon de Norvega Esperantisto.

Principe estas tasko por la estraro dissendi tion. Se ne estos ia volontulo en Oslo, la sekretario dissendos. Ni devas trovi praktikan solvon.

4. Ĝisdatigo pri Esperantonia

La estraro diskutis ĉu eblas luigi kunvenĉambron al eksternaj grupoj. La estraro kontaktu Cato por ideoj. Anne Karin montris bildojn de la ejo.

6. Landa Kongreso 2015

Okazos landa kongreso en 2015. Alvenis propono pri teni landan kongreson en Lesjöfors.

Avantaĝo: Niaj elspezoj venos al Esperantomovado. Malavantaĝo: Estas iomete komplike vojaĝi tien.

Anne Karin kontaktos la Esperantodomon en Lesjöfors pri la ĉambroj, vojaĝo ktp.

La estraro decidis serĉi aliajn alternativojn en Norvegio por diskuti.

La landa kongreso 2013 decidis, ke la estraro elektos komisionon por trovi lokon.

Elektita komisiono: Anne Karin, Jardar, Amelie, Ulf

7. Eventualaĵoj.

La plej aktuala numero de Norvega Esperantisto ankoraŭ ne presiĝis, ĉar nek la prezidanto nek la vicprezidanto havis verki ĉefartikolon. Amelie kaj Mario nun verkos artikolon.

La interkonsiliĝo daŭris 19:30 - 21:20

La venonta interkonsiliĝo okazos la 7-an de novembro 2013